Manfredo Ratislavo,

Dormu nun, infanet'

Dormu nun, infanet',
sonĝu dolĉe vi,
gardos vin anĝelet'
kaj la kara Di'.

Subiris jam la sun',
alte ĉe l' ciel'
staras la hela lun',
ankaŭ kelka stel'.

Se volos nia Di',
levos sin la sun',
kaj revekiĝos vi,
dormu bone nun.

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-562-1134 (2010-09-19 10:20:35)

Mi, Manfred Retzlaff, verkis tiun por miaj malgrandaj infanoj kiel endormigan kanton. Ĝi estas kantebla laŭ propra melodio.